# Informilo de

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

Jarkolekto
Jargang 3 N° 2 febr. 1983

## BONVOLU NE FORGESI

LA SEMAJNON DE INTERNACIA AMIKECO DUM LA SEMAJNO DE LA 20-A ĜIS LA 26-A DE FEBRUARO

LA KADROKURSO-TAGOJN :

- JE 05 03 1983 : HISTORIO FARE DE F. ROOSE
- JE 16 03 KAJ 23 04 1983 : KOMUNIKADO FARE DE A. TILMONT

ĜENERALA JARKUNSIDO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO JE SABATO 19-A DE MARTO EKDE 14.00 H. EN ESPERANTO-DOMO, FRANKRIJK-LEI 140, ANTWERPEN.

LA ĜENERALA KUNSIDO ESTAS ALIREBLA AL ĈIU INTERESITO.

LA GRUPESTROJ BONVOLE ALVOKU SIAN MEMBRARON AL PARTOPRENO.

ESPERANTO

Amikeco trans limoj

I N F O R M I L O — Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto
Abono : BF 150,-

---

**FLANDRA ESPERANTO-LIGO**
Frankrijklei 140,2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00
Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

**E S T R A R O**

Edw. SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT 03/666 62 66
prezidanto/Informado, Planado/Agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK 03/827 24 4[illegible]
vic-prezidanto/int[illegible] revizoro/[illegible]etoj

Jules VERSTRAETEN, St. Bernardsesteenweg 1078
2710 HOBOKEN 03/827 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL 03/449 50 06
sekretario/kunordigado

Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35
2000 ANTWERPEN
direktoro de GCA/ librotenado

Kristin TYTGAT, St. Hatebrandstraat 8
2510 MORTSEL 03/449 50 24
reprezentanto FLEJA

**K O M I S I I T O J**

Hilde VANINGELGEM, Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS, Knaptandstraat 36, 2700 St. NIKLAAS
intergrupa agado

André STAES, Jan Denucéstraat 1/198 2020 ANTWER[illegible]
kadrokursoj

Christian DECLERCK, Ame[illegible]lei 135/2 [illegible] ANTWERPEN
literaturaj, tradukaj, eldonaj aferoj

Annie BOLLAERTS, Zomerlaan 16, 1500 HALLE

Herman DECEUNINCK, Floralaan 21, 1510 HALLE-BUIZINGEN
gazetara servo

Ivo DURWAEL, P. Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM
volontula servo

**FAKAJ KUNLABORANTOJ**

Wim DE SMET, Hertendreef 12, 2180 KALMTHOUT
sciencoj

Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33, 2180 KALMTHOUT
komputeraj aferoj

---



## A L V O K O J

### Memorigo

La estraranoj, komisiitoj kaj fak-kunlaborantoj de FEL, samkiel la respondeculoj de FLEJA kaj aliaj kunlaborantaj asocioj estas petataj havigi al la sekretario kiel eble plej baldaŭ kaj laste antaŭ fino de februaro sian raporton rilate al tio, kion ili sukcesis aŭ klopodis realigi dum 1982.
Tio permesos al la sekretario prepari bonorde la estontan ĝeneralan kunsidon en marto.

La grupestroj bonvolu konigi al la sekretario samcele kaj sam-periode :
- prezidanto
- sekretario
- kasisto
- administranto/reprezentanto en FEL ( 1 por ĉiu komenciĝinta kvindeko da membroj je 31 12 1982)
- korespondadreso de la grupo.

Rilate al Esperantokursoj, la koncernaj grupestroj ankaŭ bonvolu sciigi :
- lokon, tagon, horon de la kursoj
- nomon de la kursgvidanto
- nombron da partoprenantoj
- informeblecojn
- partoprenkondiĉojn

Koran dankon pro via kunlaboro !

----------

## K O M U N I K O J

### HASSELT

En Hasselt laŭŝajne la movado bone funkcias, progresas ni diru prefere.
La grupo, kiu nun havas dudeko da membroj, okazigas ĉiumonate je la kvara lundo, kulturan programon, dum daŭre okazas rapidkursoj.
Temas pri kursoj por komencantoj, konsistantaj el 6 lecionoj de po 2 horoj.
Ilin gvidas Albert Claesen.
Kunvenejo kaj kursejo : Hotel Majestic, Grote Markt 2, 3500 HASSELT.
Info : Albert Claesen, Zonnebloemstraat 7, 3610 Diepenbeek. Tel 011/33 66 03

--------

S-ro E. Jamart, alia membro de ESPERANTO HASSELT, sukcesis konvinki la ĉef-bibliotektisto de la provinca biblioteko de Hasselt, aĉeti nederland-lingvajn verkojn pri Esperanto.

-------

NIEUWPOORT

De la 12-a ĝis la 15-a de majo okazos en Nieuwpoort Seminario pri Nova Biologia Nomenklaturo.

Info : Asocio NBN, Hertendreef 12, 2180 KALMTHOUT.

-------

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO - K A D R O K U R S O J

La ideo de kadrokursoj disvastiĝis kaj decidiĝis en la sino de BEF okazigi serion da ili en la trilanda angulo Aachen/Lieĝo/Maastricht.

La iniciaton prenis Marc Demonty kaj André Mertens-Goossens, respektive prezidanto kaj ĝenerala sekretario de BEF kun la helpo de D-ro Denoel el Lieĝo kaj liaj kunlaborantoj.

Temas pri internaci-skala eksperimento, konsistanta el - pro tempomanko ne kompleta - serio de kadrokursoj kiuj jam okazis en Antverpeno.

Jen la ĉi jara programo :

- 12 03 1983 : Parolteknikoj (publikaj paroladoj) gvidota de Paul Peeraerts.
- 30 04 1983 : Kunven- kaj debatteknikoj " " "
- 28 05 1983 : Movadhistorio " D-ro Pol Denoel
- 18 06 1983 : Komunikado, inform k. propagandteknikoj " Anne Tilmont.

La kursoj daŭros de la 10-a ĝis la 16-a horo, kun tagmeza ripozo. Manĝi eblos favorpreze en la ĉirkaŭaĵo de la kursejo, nome la ŝtatlernejo de de Aubel.

Aliĝilo nepre sendota al S-ro Marc Demonty, av. des Missionaires/Missionarissenlaan 39/5, 1080 BRUSELO. Nur aliĝintoj ricevos personan konfirmon antaŭ ĉiu kurso.

Pliaj informoj ĉe M. Demonty, tel 02/520 19 44.

Ni deziras al la organizantoj fruktodanan laboron kaj multe da sukceso.

--------



# P R O T O K O L O

PRI LA ESTRARKUNSIDO DE SABATO 05 02 1983 EN AALST, ARBEIDSSTRAAT 21

Ĉeestas : (alfatbete) Jan Bovendeerd (JB), Roger De Schepper (RDS), Petro De Smedt (PDS), Trees Dooms (TD), Ivo Durwael (ID), Kristin Tytgat (KT), Paul Peeraerts (PP), André Staes (AS), Hilde Van Ingelgem (KVI), Jules Verstraeten (JV)

Malĉeestas : Edward Symoens (eksterlande)

Prezidas : RDS

Protokolas : JB

----------

Komenco : 10.00 h.

1. La protokolo pri la antaŭa estrar-kunsido estas aprobita.

2. Financoj

2.1. PP prezentas kaj komentas la bilancon 1982.

2.2.1. Plej interesa punkto estas ke la deficito malpliiĝis. Tamen evidentiĝas ke daŭrigi per ne-plu-farado de ŝuldoj ne ankoraŭ eblas.

2.2.2. Aliflanke, ne trovitaj ankoraŭ estas la necesaj monfontoj por sanigi la situacion.

2.2.3. El la longa diskutado kiu sekvas, ni povas substreki ke lasi fari la estraron sola ne estas bona investo por la movado. La estraro jes respondecas pri la funkciado de la movado, la estraro jes disponas pri (la) financaj rimedoj, la estraro jes klopodegas kombini unu kun la alia, sed ĝi normale ne povus rajtus fari tion senkontrole kaj senhelpe.

2.3.1. PDS opinias ke mankas du ĉefaj elementoj en la estraro
- kontrolo de la elspez-kontoj kaj de la farataj laboroj por trovi la erojn kiuj permesus bremsadon de la elspezoj
- esploro de la financebloj.

Li proponas realigi tion kiel eble plej rapide.

2.3.2. Jam kelkaj ideoj naskiĝas el kiuj jen interesa de ID :
Ni ne timu akiri libervolajn donacojn, sed estu konkretaj. Kiam la donaconto scias kial oni petas monon, li pli facile donas.
Ekzemple : la estraro planas efektivigi ion, ni diru kadrokursojn, por resti ĉe la realeco, ĝi buĝetu tion kaj honeste diru la verŝajnan kosto-prezon

2.3.3. PP estas petata jam fari unuan provon pere de Esperanto Panorama ĝuste en rilato kun la kadrokursoj.

2.4.1. PDS proponas kunvoki kvanton da homoj por cerbunmi kaj ide-interŝanĝi pri eblaj manieroj, eblaj rimedoj por akiri la necesan monon.

2.4.2. JB estas komisiita kunvoki serion da personoj al kunsido kiu okazos (se la

Esperanto-domo estos libera) je sabato 12-a de marto 1983 ekde 14.00 h.

3. Preparo de la posttagmeza Provinca Kunveno Orient-Flandra.

3.1. La preparperiodo fakte estis tro mallonga por bone organizi la kunvenon. Tamen la respondeculoj (TD kaj HVI) kun la helpo de PDS kaj la loka grupo, bone sukcesis kaj kunmetis interesan programon.
PDS proponas, por estonta provinca kunveno, kunvoki la estraron de la loka (=organizanta) grupo al la matena FEL-estrar-kunsido.

3.2. Serio da demandoj estos farataj posttagmeze, al kiuj respondu tiuj estraranoj kiuj kompetentas.

3.3. Parolante pri provinca agado, JB opinias ke ĉiu provinco disponu pri unu persono kiu prizorgu la kontaktojn inter la grupoj kaj la estraro, por helpi la grupa respondeculojn rilate al la administraj problemoj, konsili al ili kaj defendi ilin vid'al vide FEL-estraro.
Bonege estus se iom post iom ni povus alveni al situacio kiel tiu en Limburgo, kie ĉio, eĉ la financaj aferoj, pasas pere de unu sola persono (Guido Schroeyers) Kompreneble io tia ne estas ebla en unu paŝo, ĉar ja la strukturo-ankaŭ-per-mal-novaj-grupojne permesas saman strukturon kiel la Limburgan, ĉar ĉi tie ili havis la ŝancon komenci ĉe nulo.

4. Raportado.

4.1. FLEJA (KT) raportas ke jam kelkajn fojojn ili ne partoprenis en la estrarkunsidoj de FEL. Tion kaŭzis la foreston de la prezidanto en eksterlando. Por estontaj kunsidoj estos zorgite ke almenaŭ iu de FLEJA ĉeestos.

4.2. Pri protokoloj de FLEJA-kunsidoj estis miskomprenoj. Ili nun estos denove regule senditaj al FEL-sekretario.

4.3. FLEJA prizorgos la vesperan programon de la festo de la Semajno de Internacia Amikeco en Kalmthout je 26 02 1983. Necese estas ke ni instigu kiel eble plej multe da junuloj al partopreno.

4.4. FLEJA intencas organizi sian 6-an junularan semajnfinon dum la lasta semajnfino de oktobro ĉu en Waver, ĉu ĉe la marbordo. (vidu la FLEJA-protokolon).

5. Diversaĵoj.

5.1. PDS proponos al la Aalsta E°-grupo kandidatiĝi por la organizado de la venont-jara kongreso.

5.2. PDS ankaŭ intencas inviti la Aalstan grupon sendi sian revuon al ĉiuj grupoj aliĝintaj al FEL. En Aalst funkcias cetere korespondanto, kiu havas kiel taskon prizorgi la kontaktojn inter la diversaj grupoj.

5.3. PDS arde pledas helpi al Cesar Vanbiervliet pere de alsendo de ĉiuj eblaj E°-publikaĵoj. Cesar jam kunmetis pli ol 4.300 plenajn jarkolektojn, dum atendas pli ol 3000 ceteraj jarkolektoj de revuoj sian kompletigon.

5.4. Rilate al la membrostato kaj kotiz-renovigo, PP pretigos listojn laŭ-grupajn



cele al alvoko, ekzemple okaze de la venonta jarkunsido, al pli bona kaj persona kunlaboro por retrovi la nerepagintojn kaj malnovajn ne-plu-aliĝintajn membrojn kaj konvinki ilin al re-aniĝo.

5.5. FLEJA petas informojn pri la kongreso en Leuven, i.a. pri la kotizoj.
JB sendis leteron al Marc Van den Bempt sekve al la antaŭa estrar-kunsido, sed ankoraŭ ne ricevis respondon.

Fine de la estrar-kunsido je 12.30 h.

-----------------------

P R O T O K O L O

pri la PROVINCA KUVENO ORIENT-FLANDRA de sabato 05 02 1983 en AALST.

Krom la matenaj kunsidintoj, partoprenis 20-o da personoj el la provinco.
La kunsidon antaŭis tre interesa vizito al vizitind-, vidindaĵoj de la urbo Aalst gvidata de Hilde Van Ingelgem.

Prezidas la kunsidon : PDS
Protokolas : JB
Komenco 15.30 h.

La celo de la kunveno estis konigi la estraranojn al la membroj de la provinco kaj vice-verse, konigi la movadan strukturon kaj rilatojn kun aliaj Esperanto-organizoj, respondi al demandoj de interesitoj, esplori eblecojn pri bone reci-proka agado k.s.

1. Organizado de la movado en Flandrio kaj Belgio kaj rilatoj kun BEF, APE k.a. (JB)

Antaŭ 1962 ekzistis en Belgio i.a. Flandra Ligo Esperantista (FLE) kaj Reĝa Belga Esperanto Movado (RBLM).
Kun la celo unuigi lafortojn, decidiĝis en 1962 kunmeti la du organizojn kaj krei Belga Esperanto-Federacio (BEF). Tamen, pro la politikaj strukturŝanĝoj en Belgio, estis necese denove disigi la federacion kaj kreiĝis en 1978 Flandra Esperanto-Ligo (FEL) kaj Asocio por Esperanto (APE).
Dume restis BEF kiel kupola organizo, ĉar UEA rekonas nur unu landan asocion.

2. Stato de la Movado en Flandrio. (JB)

En 1978 FEL startis kun 11 grupoj. Tamen la tiama ministro pri Nederlanda Kulturo (S-ino De Backer) estis ellaborinta dekreton laŭ kiu Asocioj sen Profitaj Celoj povus akiri de la ŝato pagitajn oficistojn je certaj kondiĉoj. Tiuj estis : havi almenaŭ 20 grupojn en Flandrio rajtigis je unu oficisto, 40 je 2 kto.
Por profiti de tiuj favoraj cirkonstancoj, FEL tuj ekagadis por akiri almenaŭ tiujn unuajn 20 grupojn per ĉiuj manieroj kaj, dank'al la helpo de la plej fortaj grupoj,

sukcesis pli-altigi la nombron de grupoj al 24. Tiel do FEL akiris la unuan de la ŝtato pagitanoficiston, almenaŭ tiel aspektis. Ja sin kaŝis vipuro en la herbo pri kiu neniu kalkulis, ne povis kalkuli je tiu momento.

3. Financa situacio

Antaŭ ol ricevi ion de la ŝtato, oni devas elspezi dum du jaroj. (unuan jaron buĝeti duan jaron elspezi, trian jaron recevi, tio estas la principo).
Kalkulante je la promesoj de la ŝtato, FEL do prunteprenis la necesan monon por pagi dum du jaroj sian oficiston kaj rericevi tiun monon ekde la tria jaro.
Jes, sed intertempe la belga ŝtato mergiĝis en ekonomia krizo kaj pagis nur la duonon de tio je kio ni rajtis kaj jen FEL en seriozaj malfacilaĵoj. Ĉu la ŝtato iam pagos la promesitajn sumojn,tute ne estas certe. Verŝajne neniam.

Konsidere al tiu situacio FEL do ne daŭrigis sian agadon por akiri kiom eble pli da grupoj (40 da ili ja estus rajtigonta al dua plentaga oficisto). Decidiĝis, anstataŭ ankoraŭ paroli pri grupoj, insisti sur la reprezentado en la diversaj komunumoj. Ekzemple nun FEL estas reprezentata en + 120 komunumoj (+ 180 poŝt-kodoj). Tio verŝajne pli impresos ol la 19 grupoj kiujn ni nun havas.

Eble noti en la marĝeno, ke FEL nun nombras 659 membroj el 19 grupoj.
Notenda fenomeno estas, ke la membro-nombro malkreskas, dum la informpetoj daŭre kreskas.
JB ĉi tie denove arde pledas por komuna agado por retrovi kaj konvinko al realiĝo malnovajn-ne-plu-aliĝintajn membrojn, por aligi kiel eble plej multe da novaj membroj, por vendi kiel eble plej multe da subtenkartoj kaj krei kiel eble plej fortan aron da subtenantoj.

Sed revenu ni al la financoj.
FEL ankoraŭ ĉiam troviĝas en malfacila financa situacio. La deficito jes malpliiĝis, sed la ŝuldoj ankoraŭ ne kvitiĝis. Nia nura savo el la puto ŝajnas esti ebla nur per memfinancado sen plu kalkuli je ŝtataj subvencioj. Se tiuj ankoraŭ venas, ni konsideru ilin kiel hazardan profiton.
Pri la cetero ni referencas al la protokolo pri la antaŭtagmeza estrarkunsido.

4. Funkciado de Esperanto-domo

La Esperanto-domo en Antverpeno estas posedaĵo de Institucio Hodler, kiu plu-luas ĝin al Grafika Centro Antverpeno (GCA), FEL, LA VERDA STELO.
Ĝia direktoro estas Paul Peeraerts kiu, kun sia stabo (10-o da personoj) prizorgas, krom la laboroj rilataj al GCA (UEA), la administradon kaj librotenadon de FEL.
Normale estas ke tiu ĉi profesia laboro altigis la kostojn kompare kun la antaŭa situacio, sed samtempe kreis la eblecon por pli okupi sin kun organizaj laboroj
La rezulto cetere jam sentiĝas kiam oni komparas la nunan kun la pasinta periodo.



PDS proponas paŭzon de + duona horo, sed konstatinte ke la personaj kontaktoj kaj diskutoj estas tre viglaj, li decidas lasi la ĉeestantojn daŭrigi sian agrablan kaj viglan interparoladon kaj fini la kunsidon de si mem.
Poste li proponas mallongan kunsidon inter FEL-estraro kaj la respondeculoj de la loka grupo.

KONKLUDO

La kunveno estis tre taŭga kaj sukcesa. Atentinde tamen estas plani pli frue por lasi pli da tempo por la preparado. Aliflanke FEL-estraro invitu la lokajn respond-eculojn al sia preparkunsido. Dezirinde ankaŭ estas organizi komunan manĝon, ĉar fakte la ideoj pli facile ŝprucas al la surfaco dum liberaj, neoficialaj babiladoj.

TD kaj HVI proponas okazigi la venontan provincan kunvenon en Kortrijk por Okcident Flandrio. Ili kontaktiĝos kun Cesar Vanbiervliet.

POSTKUNSIDAJ RIMARKOJ.

PDS proponas kunvoki duan grupon da homoj, cele al formado de "komisiono pri ŝparoj" homoj kiu ekzamenu la kontojn kaj konsilu pri bona mastrumado de la financaj rimedoj.
Tio povus okazi en du alir-paŝoj : unu ekster-estrara, dua komuna kaj poste en streĉa kunlaboro.
Propono realigota.

JB

--------------------

FLEJA-estrarkunsido Lichtaart 1 11 1982 10h30

ĉeestas: Jan Erreygers, Jean-Pierre VandenDaele, Ite, Wim kaj
Kiki Tytgat, André Staes (parte), Gerd Jacques
ne ĉeestas pro malsano: Ilse Jacques

raporto

1. Estraro: divido de la taskoj

Administranto: Gerd Jacques petas sian demision el la estraro de Fleja. Kiki tamen petas ŝin, resti kiel estrarano, sed eventuale sen tasko sed kiel konsilanto. Pro sia laboro en GCA Gerda ja povas multege helpi al Fleja. Gerd ne povas akcepti tiun proponon kaj la aliaj estraranoj tutkore dankas ŝin pro ĉiu farita laboro dum tiom longa tempo.

Eksteraj rilatoj: Fleja urĝe bezonas estraranon por prizorgi la eksterajn rilatojn. Ilse Jacques jam respondecas pri varbado. Fleja petas al André Staes, kiu tamen ne povas akcepti kunlaboron pri tio, ĉar li jam estas tro ŝarĝita kun aliaj aferoj. Tion ĉiuj komprenas. Ĉiuokaze novaj estraranoj povos esti elektitaj nur dum la venonta jarkunveno. André jes promesas serĉi personojn en sia vespera kurso por eventuale helpi Fleja-n.

Kongresoj: ni devus decidi pri la venonta kongresejo fine de novembro. Jan kaj Wim vizitos iun ejon en Waver. Lichtaart kostas al ni 85 fr. por persono por unu tagnokto. Pri la temo ni decidos ĝis kristnasko kaj la unua aliĝilo estos preta ĝis pasko.
Ŝajne Chris Suykens, Bob Venhuizen kaj Olle el Hago jam certe volas kunhelpi en la kuirejo. Ideo estas eble organizi la semajnfinon kiel lingvokurson kun ankaŭ programeroj pri iu movada temo.

Dum la taskdivido en la estraro ni devas nepre kunlabori kun FEL por eviti, ke laboro estas farita du fojojn.
Post la jarkunsido en marto ni devas deponi la membrolistojn ĉe la aktuarejo kaj meti la novan estraron en la Ŝtatĵurnalo. Nun Ite havas malfacilaĵojn kiel kasisto pagi ekz. per la poŝtĉekkonto.
Kiki ekzamenas leteron pri VZW de la ministerio pri financoj, subskribas kaj deklaras la "moveblajn posedaĵojn".



2. membrokotizo 1983

Pri la kotizo por 83 ŝajne FEL decidis intertempe. Nova afero estas, ke FEL bezonas parton de la membrokotizo de Fleja kaj ke oni nun devas ankaŭ pagi AVI. La revuo Koncize ne plu povas esti inkluzivita en la membrokotizo, ĉar tiam la kotizo por Fleja estus pli alta ol tiu por FEL. Tamen bedaŭrinde, ĉar nun la Fleja-membroj ricevas nur nederlandlingvajn revuojn kaj ilia Esperanto-nivelo estas jam sufiĉe malalta.

3. broŝuro en kvar lingvoj pri Esperanto por la junulargastejoj: NEJ jam faris la kompillaboron kaj ni povas aĉeti 3 000 ekzemplerojn po 1,40 fr. Ilse petos al la junulargasteja centralo en Antverpeno, ĉu eblus dissendi tiujn broŝurojn al ĉiujn gastejoj de la lando el la centralo, do senpage por ni. Se jes, Ite aranĝos la financan parton kun Gerard Gerritse, kasisto de NEJ.

4. Jen

Fleja devas ankoraŭ pagi tre altan fakturon de Jen al UEA. Ite aranĝos kun Gerard Gerritse, kiom NEJ devas pagi al Fleja, sed ŝi petos al GCA estonte du fakturojn, ĉar nun la tuta elkalkulado ŝajnas kaosa.

5. interŝanĝoj PSEK-FLEJA (Pola Studenta Esperantista Komitato)

kondiĉoj: 1) la poloj pagas la restadon de la flandroj en Pollando kaj inverse;
2) la flandroj eskapas al la deviga devizŝanĝo en Pollando;
3) ni pagas la vojaĝon ĝis la pola landlimo kaj la poloj pagas sian vojaĝon ĝis la belga landlimo.

Kiki tiel proponas la ideon de interŝanĝoj, kiu naskiĝis dum ŝia restado en Varsovio. Fleja montras intereson, sed ni tamen ne metos jam artikolojn pri la tuto en revuoj, ankaŭ pro la malbona politika situacio nun de la lando. Kiki tamen skribos al PSEK (Paweł Janowczyk) kaj invitos polojn por la venonta Fleja-renkontiĝo.

6. T- kaj Ŝvitĉemizoj

Ite proponas mem aĉeti la ĉemizojn kaj tiam Cornil povas ilin surpresi. Tio ĉar Cornil donis du fojojn tute malsamajn kvalitojn kaj mezurojn por la sama mendo.

7. Jean-Pierre redaktas la raporton pri Lichtaart por la ministerio.

fino: ĉirkaŭ tagmezo
kiki tytgat

oOo

# F L E J A

PROTOKOLO pri la estrarkunsido de 22 01 1983 en Antwerpen - 19h30 - 22h30

Ĉeestas : Ite kaj Kiki TYTGAT, Kris SUYKENS, Herman VAN EYNDT, Jean Pierre VANDEN DAELE, Ilse JACQUES, Dré STAES (ĉ. 200h00).

Senkulpigis sin : Gerd JACQUES (laboro), Bob VENHUIZEN, Anne TILMONT, Wim TYTGAT (malsana), Jan ERREYGERS.

## 1. RENKONTIĜOJ

### 1.1. Lichtaart '82 :

La subvenciraporto pri Lichtaart ne estis farita, ĉar la Ministerio pri Nacia edukado kaj Nederlanda Kulturo ne reagis al nia subvencipeto farita je aŭgusto. La financa raporto estos pritraktita fare de Gerd kaj Ite post 2 semajnoj.

### 1.2. 6-a FLEJA-renkontiĝo '83 :

Ĝi okazos de la 28-a vespere ĝis la 30-a de oktobro 1983.

La kerngrupo konsitos el : Jan ERREYGERS (ĉeforganizanto), Wim kaj Kiki TYTGAT.

La loko (Wavre aŭ marbordo) dependas de la petotaj prezoj. La aliĝiloj estu pretaj antaŭ Pasko. Dré kaj Kiki preparos ilin.

Subvencioj denove estos petitaj de la Ministerio pri Nacia Edukado kaj Nederlanda Kulturo, sed ankaŭ de la Regiona Konsilantaro (Gewestraad) kaj eventuale de la Eŭropa Junularfonduso (tiam ni havos temon ligitan al Eŭropo). Se la renkontiĝo okazos en Wavre, ni povos ankaŭ peti subvencion de APE (kadre de propagando por valonaj junuloj).

Farendaj aferoj :

- financoj
- administrado kaj subvencipetoj (kunlabore kun Jean Pierre)
- ejo kaj programo
- kuirejo (Pierre, Kris kaj Bob, eventuale ankaŭ Herman)

Ĉi foje ne estos speciala vegetara menuo. Anstataŭigita menuo estu denove petita dum la kunvenomem ĉe la kuireja servo, kiel dum antaŭaj jaroj.

### 1.3. Kalmthout

Dum la tago de Internacia Amikeco je 26 02 1983 en Kalmthout, FLEJA prizorgos la vesperan programon (laŭ peto de Wim De Smet). La preparadoj okazos dum la karnavala renkontiĝo en Dover. La vespero okazos je la 19-a ĝis la 23-a horo kun jenaj eroj :

- kvizo (gvidota de Wim TYTGAT)
- kantado (Guido Schroeyers kaj Ite Tytgat) kaj skeĉoj (Dré)
- dancmuzika (disko) satiro (Anne Tilmont)
- dancvespero (muzikon prizorgos Guido Baeyens)
- designitaj filmoj estos projekciitaj kiam iu alia programero forfalos.

Kiki telefonos al Wim De Smet por proponi nian programon.



### 1.4. IJK '82 (Leuven) :

Se necese Herman Van Eyndt kontaktos FLEJA-n pri la financa raporto de la IJK. Herman petu la fakturon por la IJK-kongresinsignoj de Gerd, ĉar la maŝino oficiale ankoraŭ estas ŝia. Pri la problemoj tiurilate de la UK, FLEJA ne okupiĝu.

### 1.5. IJK '83 (Debrecen) :

5 FLEJA-anoj (3 sub kaj 2 super 26-jaraj) kiuj iros al IJK Debrecen pagu sian kotizon al Ite Tytgat. Pro la interŝanĝo okazinta dum la IJK en Leuven kun 5 Hungaroj, FLEJA ricevos la monon de la kotizoj de 5 Belgoj.

## 2. JARKUNVENO

Ĝi okazos en la Esperantodomo en Antwerpen la 6-an de marto je la 10-a horo. Ĉiuj (inkluzive Gerd kaj Jan Erreygers) estas petitaj sendi aŭ doni ŝian kontribuon por la jarraporto al Kiki antaŭ 28 01 1983. Ĉiuj FLEJA-anoj estos invititaj de Jean Pierre. Kiki mendos la salonon ĉe Bob kaj diktos al Jean Pierre la skemon de la provizora tagordo.

## 3. LIBROSERVO

FLEJA ne povas, se necesus, fariĝi la libroservo de la lando (pro manko de kapitalo kaj pro troa laboro de ĝia prizorganto Ite). La kunlaboro kun FEL estos esplorata dum la estrarkunsido de FEL (05 02 1983), ankaŭ por ŝpari temnon inter la mendo kaj la ekspedo de libroj (vd la labornoton de GCA).

## 4. JEN

Instigi flandrajn kontribuantojn por JEN; Herman Deceuninck kaj Annie Bollaert estu konvinkitaj uzi la gazetaran servon ankaŭ serve al JEN. EK direktu sin pli al komencantoj. Tekstoj estos skribitaj de diversaj FLEJA-anoj. Kontrolado kaj kunmetado restos ĉe GCA.

## 5. DIVERSAĴOJ

### 5.1. Junulargastejoj :

Ilse demandos al la junulargastejo-centralo ĉe eblos sendi informilon pri Esperanto al ĉiuj gastejoj de la lando. - Ŝi jam ricevis pozitivan respondon. Do, Ite transprenos 3000 ekzemplerojn de NEJ (po 1,40 F.) kaj aranĝos la financojn kun Gerard Gerritse. La tuto okazu en la printempo !

### 5.2. Varbiloj UEA/TEJO :

Jean Pierre prezentas kelkajn UEA/TEJO-verbilojn, ŝajne senpage riceveblajn post mendo ĉe CO. Ite mendos ilin por la libroservo.

### 5.3. Estraro pri junularedukado (Bestuur voor Jeugdvorming) :

Kiki esploros denove ĉu eblos esti akceptita kiel ano de tiu ĉi instanco (konsiderante la membronombron).

### 5.4. FEL-kunvenoj :

Kiki ree partoprenos kiel delegito de FLEJA kaj serĉos anstataŭanton se ŝi ne povos.

5.5. Pasporta Servo :

Estas dezirata mapo pri la gastigantoj en Belgio por la eldonajo de Pasporta Servo. Ĝi estos presita en Germanio kaj la gastigantoj estos menciitaj laŭurbe. Ite aperigos en INFORMILO enketon por la belgaj Esperanto-Asocioj por ke ŝi havu aktualajn informojn pri la nunaj gastigantoj. Tiuj ĉi informoj estos sendotaj al Germanio por aperigado en la sekvontajara libro.

Protokolis : Jean Pierre VandenDaele

Prezidis : Kiki Tytgat.



# RADIO-PROGRAMOJ EN ESPERANTO

Vi trovas ĉi-sube ĉiujn aktualajn indikojn laŭ la mezeŭropa tempo. Por eltrovi la ĝustan tempon en via regiono, konsultu la mapon de tempozonoj en la poŝkalendaro sur paĝo 4. Por havi nun la grenviĉan tempon, subtrahu unu horon. Se ne estas aliaj indikoj, la frekvencoj estas en kilohercoj kaj la ondolongoj en metroj. Plejparte temas pri kurtondaj frekvencoj.

| stacio | tago | horo | frekvencoj | metroj |
|---|---|---|---|---|
| Varsovio (Radio Polonia) | ĉiutage | 6.30- 7.00 | 6135, 5995, 7270, 3955, 1503 | 48,90; 50,04; 41,27; |
| Esperanto Redakcio | | | | 75,85; 200,00 |
| Poŝtkesto 46 | | 12.00-12.30 | 9525, 7145 | 31,50; 41,99; |
| PL-00950 WARSZAWA 1 | | 17.30-18.00 | 7285, 6095 | 41,18; 49,22 |
| | | 20.30-21.00 | 7285, 6095 | 41,18; 49,22 |
| | | 22.30-23.00 | 7285, 6095 | 41,18; 49,22 |
| | | | 5995, 3955, 1503 | 50,04; 75,85; 200,00; |
| Bern (Svisa Radio Internacia) | lunde | | 9535, 6165, 3985 | 31,48; 48,66; 75,28 |
| Esperantofako | ĵaŭde | | | |
| CH-3000 BERN 15 | sabate | 19.00-19.10 | | |
| | | 21.30-21.40 | | |
| no (Aŭstra Radio) | dimanĉe | 6.45- 6.57 | nov'82-maj'83: | |
| F Esperantoredakcio | | | 6155, 5945, 17745 | 48,74; 50,46; 16,91; |
| Poŝtfako 700 | dimanĉe | 10.45-10.57 | 6155, 7170, 9770 | 48,74; 41,48; 30,71 |
| A-1041 WIEN | vendrede | 17.55-18.00 | 89,8 MHz en MF | (UKW) nur loke aŭdebla |
| Vatikano (Radio Vatikana) | | | 1a Eŭropa Programo | |
| Esperantoredakcio | dimanĉe | 21.05-21.15 | 6190, 6210, 7250, 9645, 1530 | 48,47; 48,30; 41,38; 31,10; 196 |
| I-00120 | | | Afrika Programo | |
| CITTA DEL VATICANO | | | 9625, 11700, 15120 | 31,17; 25,64; 19,84 |
| | ĵaŭde | 7.10- 7.30 | 2a Eŭropa Programo | |
| | | | 6210, 7250, 9625, 11715, | 48,30; 41,38; 31,17; |
| | | | 11740, 15120 | 25,61; 25,55; 19,84 |
| Romo (Radio Roma RAI) | | | tutjara: 7275 | 41,24 |
| Esperantoredakcio | sabate | 21.00-21.20 | mar-okt: 9710, 11800 | 30,90; 25,42 |
| C.P. 320, I-00100 ROMA | | | nov-feb: 7290, 9575 | 41,15; 31,33 |
| Zagrebo (Radio Zagreb) | marde | 23.45-24.00 | 1134, 1143 | 264,70; 262,00; |
| Esperantoredakcio | | | | |
| Jurišićeva 4, | | | | |
| YU-41000 ZAGREB | | | | |
| Sabadell (Radio EAJ-20) | merkrede | 22.30-22.45 | 882 | 340,1 |
| Esperantoredakcio | | | 90,9 MHz | en MF (KW) |
| C. Convento 22 y 24 | | | | |
| SABADELL, Hispanio | | | | |
| Pekino (Radio Pekino) | ĉiutage | 21.00-21.30 | 9965, 9365, 7470 | 30,10; 32,00; 40,10 |
| Esperantofako | | por Eŭropo | | |
| BEIJING | | 23.30-24.00 | 11515, 9860 | 26,06; 30,40 |
| | | por Latin Ameriko | | |
| | | 12.00-12.30 | 7315, 9860 | 40,10; 30,42 |
| | | por Japanio kaj Koreio | | |
| | | 14.00-14.30 | 15165, 11685 | 19,78; 25,60 |
| | | por Sudorienta Azio | | |
| Valencio | sabate | 21.30-21.45 | 1314 | 228,3 |
| adio La Voz de Valencia) | | | 96,9 MHz | en MF (UKW) |
| perantofako | | | | |
| . del Cid 154 | | | | |
| VALENCIA-14, Hispanio | | | | |
| Rio de Janeiro | lunde | 0.00- 0.15 | 1400 | 214 |
| (Brazila Spiritisma Federacio) | | | | |
| av. Passos 30 | | | | |
| BR-20000 RIO DE JANEIRO ZC 58 | | | | |
| Brazilo | | | | |
| Sorocaba | lunde | 1.00- 2.00 | 1080 | 278 |
| (Rádio Clube de Sorocaba) | | | | |
| Esperanto-Redakcio | | | | |
| rua de Penha 455 | | | | |
| BR-18100 SOROCABA SP | | | | |
| Brazilo | | | | |
| Liberecana Radio Parizo | vendrede | 20.00-21.00 | 89,6 MHz | en MF (UKW) |
| 145, rue Amelot | | | | |
| F-75011 PARIS, Francio | | | | |

# VLAAMSE ESPERANTOBOND
# FLANDRA ESPERANTO-LIGO

---

## KADROKURSOJ 1982-1983

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Sabaton 23 10 1982 | 09.00 - 10.00 h. | mallonga ekzameneto pri lingvokono | |
| | 10.00 - 16.00 h. | PAROLTEKNIKOJ fare de Paul Peeraerts<br>Publikaj paroladoj | |
| " 27 11 1982 | 09.00 - 10.00 h. | ekzameneto (se necese) | |
| | 10.00 - 16.00 h. | LITERATURO | Christian Declerck |
| " 18 12 1982 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | INSTRUTEKNIKOJ | Emiel Van Damme |
| " 22 01 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | KUNVEN- kaj<br>DEBAT-TEKNIKOJ | Paul Peeraerts |
| Ø " 05 03 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | HISTORIO | Fernand Roose |
| " 26 03 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | KOMUNIKADO<br>Inform/propagand-teknikoj | Anne Tilmont |
| " 23 04 1983 | s a m e k i e l 26 03 1983 | | |

Ø Pro la Semajno de Internacia Amikeco, la kursoj ne povas okazi, nek je 19 02 1983, nek je 26 02 1983.

Por pliaj informoj : ESPERANTO-CENTRO, Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
André STAES
Jan BOVENDEERD

La kursoj okazos en ESPERANTO kaj estas alireblaj al ĉiu.



FEL-KADROKURSOJ

Nia amiko el Aalst, la nelacigebla Petro De Smedt, kiu jam regule gvidas r a p i d - kursojn,proponas prizorgi plian kadrokurso-tagon en la serio de la jam okazanta kadrokursoj. Lia temo "TRADUKADO".

Ni proponas okazigi tiun tagon je sabato 28-a de majo. Pri tio ni tamen ankoraŭ ne certas, kvankam tio verŝajne tamen ĝustas.

Pliaj detaloj poste kaj en venontaj numeroj de INFORMILO.

-------

ESPERANTO-VORTARO

Esperanto-Centro Nederlando komunikas :

La eldonejo "Het Spectrum" estas preskaŭ preta kun la kompletigo de la Nederlanda teksto de la vortaro, sed la tradukoj de tiuj kompletigoj estas tempo-raba afero.

La nuna stato de la Fonduso Esperanto-vortaro estas nun Nd gld 14.712,94. La rentumo por 1982 sumiĝas je gld 821,91.

Ĝojige estas ke envenis jam provizoran mendon de 1000 ekzempleroj. Entute mendiĝis jam 1502 ekzempleroj.

--------

UK Budapeŝt.

Paula DOCQUIER el Brasschaat serĉas kampademulojn por iri kun ŝi al Budapeŝt okaze de la venonta Universala Kongreso.

Info : Paula DOCQUIER, De Heuvels 28, 2130 BRASSCHAAT. Tel 03/651 86 79.

----------

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

- Sabaton 19-an de februaro - MORTSEL, Hof van Rieth : ekde 20.00 h.
  Komuna manĝo sekvota de amuza vespero.
  Info : J. Bovendeerd Tel 03/449 50 06
- Dimanĉon 20-an de februaro : LEUVEN - Pavilon Arenberg : ekde 14.00 h.
  Solena malfermo + tre riĉa kaj varia programo
  Info : ESPERANTO 2000. Tel 016/20 14 53
- Sabaton 26-an de februaro - KALMTHOUT (Heide-) - ekde 10.00 h.
  Tut-taga programo tre varia sekvota de amuza vespero prizorgata de FLEJA.

Legantoj skribas.

Pri kunvenoj.

Vi metis la demandon : Kion fari por plaĉi al ili ?
Mi pensas, ke la plimulto preferas resti hejme kaj ricevi informilon interesan kaj amuzan. En Bruselo, prelego arigas 20 % da gemembroj.

Pri agado eksteren.

Ĉu vere gravas ke ni arigu pli da gemembroj ? Ĉu ni ne prefere varbu subtenantojn ? Aŭ eĉ pli bone :
Propono : krom varbi subtenantojn pro financaj kialoj, ni prefere lanĉu naciskale kolekton de subskriboj (= nepagintaj subtenantoj). Mi pensas ke ni povus kolekti en Belgio ± 20.000 subskribojn. Tio povus iam reprezenti imponan argumenton en la okuloj de politikistoj kaj estas ne-ripetenda, nur ampleksenda.

La lernado de Esperanto restas grava obstaklo por la publiko. Kial ne adopti strategion similan al ekzemple "Amnesty International" : kelkaj aktivuloj sed granda reklamo ? Slogano : "Ne lernu Esperanton, subtenu ĝin !"
Granda porcento de nia loĝantaro konsentas pri la enkonduko de Esperanto por siaj infanoj, ne por si mem !

Pri nacia revuo.

Kvankam belga nacio preskaŭ ne plu ekzistas, mi tamen opinias ke multe da informoj interesas la tri lingvajn grupojn. Bela flandra rakonto estas eble pli utila, cele al internacieco, en Valonio ol en Flandrio kaj inverse.

Emil Van Damme.

------------

Diskut-temo.

Ĉu prave ?

Kiam ni mem volas scii ĉu nia afero progresas aŭ ne, ni devas esplori la faktojn internajn.

L.L.Zamenhof.

En sia serio "Ĉio ŝanĝiĝas", H. Van Praag priskribas jene la hodiaŭan socion :
" Scienco kaj tekniko ŝanĝis la imagon de la tero kaj estas klare ke tiu procedo staras nur ĉe la komenco. Je tio ofte forgesiĝas, ke estas la homo kiu gvidas tiun ĉi evoluadon. Sur li ripozas la tasko zorgi, ke scienco kaj



tekniko ne eskapu lin, sed restu kaj fariĝu utila al la normoj de la humaneco. Tro superregas ankoraŭ en la praktikado de ambaŭ kulturformoj la normo de falsa afereco, de nepersoneco.
Jam en la komenco de la nuna jarcento, la germana sociologo Tönner avertis ke niaj institucioj iĝus pli fridecaj, ne-humanecaj.Anstataŭ la tradiciaj soci-formoj (familio, profesio, religio) ekestas pli kaj pli da organizo-formoj (kontoro, fabriko, sindikato) pro kiuj la moderna homo nenie sin sentas plu vere "hejme". Ĉi tie troviĝas grandparte la klarigo pri la ekesto de "nekaptebla junularo" kiu fakte estas nur soleca.

Rilate al organizado li opinias ke :

Kamparo ne permesas kompleksan vertikalan organizadon. Kamparanoj loĝas apud, urbanoj super unuj la aliajn. Ĉi tie ankaŭ troviĝas la rezisto de la kamparanoj al la ideo de "Babelturo", kie oni ne plu komprenas la najbaron.

En la ĉi supraj vidpunktoj ni trovos verŝajne ian indikon por nia por-Esperanta propagando. Ne nur ni kalkulu je la malpli-humaneciĝo de la socio, je la pli kaj pli dis-er-iĝo en ĉiam pliaj novaj , ĉiam pli apartaj organiz(et)oj, ni ankaŭ lernu alpaŝi la homojn laŭ ilia sinteno, ilia animstato, ila akceptemo de novaj ideoj.

Cerbumante pri la temo, ni ektrovos ekzemple plurajn indikilojn por alpaŝi la nunan societon.

Komparu : kamparanoj loĝas ofte kilometrojn for de siaj najbaroj kaj tamen havas kontaktojn kun ili. Urbanoj troviĝas amasiĝintaj super kaj apud=kontraŭ unuj la aliajn en ŝtonaj kestoj, tiel proksimaj fakte ke ili povus sin tuŝi se ne estus muroj inter ili. Tamen ili ne havas personajn kontaktojn !

Nu, antaŭ ol daŭrigi, ni tamen rigardu la kamparanon de iom pli proksime. Se mi uzas ĉi tie la terminon "kamparano", mi ne celas al tiuj urbanoj kiuj aĉetis kamparan terenon por fuĝi la urban bruadon kaj konstrui tie domon tiel aranĝitan ke, helpe de heĝoj, muroj k.s. ili sin trovas same izolitaj kiel en sia urba "kaĝo". Ilia sinteno ne ŝanĝiĝis. Ili nur akiris iom pli altan statuson pro "kampara bieno". Ili restas urbanoj rezidantaj en la kamparo. (Cetere, kiu urbano ŝatus estis nomata "kamparano" (boer(ke) ?

Ne, vera kamparano vivas kun siaj najbaroj. Vera, ankoraŭ ne "modern-fuŝita" vilaĝo formas loĝejon de kun-uloj kiuj sin komprenas, sin interhelpas, kune vivas. Ĉe ili ne ekzistas komunik-malfacilaĵoj. Ili ne komprenas lingvajn kverelojn. Ili ne bezonas kroman lingvon por siaj viv-bezonoj.

Do, se al kamparano ni volas paroli pri Esperanto ni uzu aliajn argumentojn ol kontraŭ lingvaj malfacialĵoj, ol al urbano.

Aliflanke, ni ne forgesu ke, por konvinki kamparanon veni al ia kunveno, ni eble sukcesos unu fojon, ĉar temas pri io nova, io nekonata, sed plian fojon nur se la intereso estas vekita. Se ne, li estos perdita. Alivorte, se kamparano eble pretas fari konsiderindan vojaĝon por io interesa, li ne ŝatas "perdi sian tempon". Ankaŭ urbano ne ŝatas perdi sian tempon, tute ne, sed li facile povas "enŝovi" plian programeron en sian liberan tempon, kiel plian varion ekzemple.
Vi certe trovos ke mi troigas memorigante ke estas pluraj vilaĝoj, ĉefe en industriaj regionoj, kie regas la "Babelturo" pro tro granda internacieco (gastlaboristoj Tamen ne forgesu ke ĝuste tie vi prefere ne parolu pri internaciismo. Tie eksterlandano estas entrudulo kiu forrabas laborpostenojn, kiu forabas socialajn pagojn. Tie eksterlandano, se li volas integriĝi (kion li verŝajne ne sukcesos) devas lerni la lokan lingvon. La eksterlandano siaflanke jam dekomence devas (leĝe) lerni lingvon de la loĝantaro kaj verŝajne ne ŝatas lerni ankoraŭ plian lingvon. Ili ja verŝajne ne estas alt-instruitaj homoj kaj ne sukcesos lerni plurajn lingvojn, eĉ facilajn. Se ni metos tiun situacion inter la urbon kaj veran kamparon, se ni konsideros tion kiel mezan vojon, kiel transiran parton, ni verŝajne pli bone komprenos unuj la aliajn.

La junularo, la "nekaptebla", ŝajnas al mi tute aparta fenomeno.
Junuloj, almenaŭ tiom, kiom ili ankoraŭ ne estas (tro) influataj de la tordiĝinta mensostato de tiuj plenkreskuloj kiuj jam estas prilaborataj kaj misformitaj de ĉiuspecaj formoj de reklamo kaj cerbo-influado, estas honestaj kaj objektivaj. Tio povas ŝajni ne vera aŭ dubinda, ĉar tiel ni ne spertas ilin. Ni ne forgesu tamen ke la junuloj (verŝajne) ne fidas la plenkreskulojn kaj ĝuste tial ne sin montras aŭ ne kuraĝas montri sin en sia vera stato, ĝuste tial ili preferas sin izoli en sia soleco. Ni ne forgesu ke plenkreskuloj sin montras hipokritaj : tro da promesoj, tro da paroloj, maltro da seriozeco, tro da (vizaĝ)ŝanĝoj. Ni ne forgesu ke plenkreskuloj, eĉ tiuj kiuj havas kontaktojn kun junuloj, eĉ tiuj kiuj pravigas la junulojn en ilia ĉeesto, tamen montras emon al malaprobo kiam ili vidas junulojn "en aktiveco" per kio ili denove pruvas ke ilia asertita kompr[illegible] fakte estas mensogo.

Se la junuloj estas nekapteblaj, solecaj, ili ne mem kulpas pri tio. La kaŭzon ni trovu en la socio, tiu socio kreita de la plenkreskuloj.

Kaj vere, mi devas konfesi, ke ankaŭ mi mem, malgraŭ multego da cerbumado, da klopodado, da peno ankoraŭ ne certas ĉu mi trovis la vojon al la junularo kaj ne scias kiel mi devos atingi ĝin. Mi nur konstatas mian senpovecon. Bedaŭrinde, sed vere.

Eble iu inter vi scias. Mi esperas.

Josuperter.